n-ro 48

aprilo 1995

ISSN 0941-9306

# La Merkato

Internacia Tradukreto (ITRE) funkcias kaj kreskas

Pluraj tradukantoj jam informis la kunordiganton pri traduklaboroj. Momente ITRE konsistas el 35 tradukantoj por 24 lingvoj. Aldoniĝis la dana, estona, greka kaj litova lingvoj. En Francio baldaŭ estos farata profesia merkat-esploro por ITRE.

Ĉar la unua ITRE-adresaro preskaŭ elĉerpiĝis, dua eldono estas planata. ITRE-anoj sendu la ŝanĝojn kiujn ili deziras pri sia ITRE-ŝildo al la kunordiganto: Daniel DURAND, Les Nids, F-49190 SAINT AUBIN DE LUIGNE; telefono/fakso (33) 41.78.47.75 (fakso aŭtomata dum nokto).

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
))))))))Q

Enhavo

Grava atentigo al la membroj . . . . . . . . . . . . . . 3
Anoncitaj aranĝoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 4
Traktato pri UE - monda merkato . . . . . . . . . . . . 6
Raportoj pri la jaro 1994 . . . . . . . . . . . . . . 7-14
Nova emblemo por IKEF . . . . . . . . . . . . . . . . . 15
Komercaj petoj kaj proponoj . . . . . . . . . . . . . . 17
Novaj aliĝoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 20
Por la membroj estas aldonita kompletiga folio de la identecŝildaro.

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
))))))))Q

La Merkato (LM) estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare kaj servas al la membraro kiel komuna komunikilo.

La Identecŝildaro estas jara eldono por la membroj de IKEF. Ĝi ne estas aparte vendata.

La Estraro de IKEF: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; D-ro István Gether, S-ro François-Xavier Gilbert; D-ro Marco Picasso; S-ro Seikô Yamasaki; S-ro Daniel König.

Revizoro por la financa raporto: D-ro Gianfranco Polerani.

Centra sidejo: ĉe s-ro Frans Josef Braun,
Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

Financa sidejo kaj membrara administrado: ĉe s-ro Roland Rotsaert,
Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio,
telefono + fakso: +32.(0)50.330004.

Atentu ! Parto de La Merkato estas sendata tra Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen. Tio estas nur sendadreso; korespondaĵoj senditaj al tiu adreso ja alvenas, sed kun prokrasto. Prefere uzu unu el la supraj adresoj.

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))Q

La jara membreca kotizo estas 400 belgaj frankoj, 20 nederlandaj guldenoj, 20 germanaj markoj aŭ 14 usonaj dolaroj.
Dumviva membreco akireblas pere de unufoja egalvalora pago de la 20-obla membreca kotizo.

Kontoj:
- ĉe UEA kaj FEL: kodo ikef-c
- belga poŝtĉekkonto (Bruselo): numero 000-1592629-83

Ankaŭ eblas pagi per eŭroĉeko (en belgaj frankoj, kun kartonumero dorse) sendota al Roland ROTSAERT.

Perantoj:

Cinio: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Esperanto-Asocio, Xiyinglu 74 hao,
CN-710054 Xi'an

Francio: S-ro François-Xavier GILBERT, F-55000 Longeville en Barrois
(CCP 1275-89 L Nancy)

Germanio: S-ro Franz Josef BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl
(Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400)

Hungario: D-ro István GETHER, Palóc u. I, H-1135 Budapest XIII

Italio: D-ro Marco PICASSO, via de Gasperi 7, I-20057 Vedano al Lambro

Japanio: S-ro YAMASAKI Seikô, J-185 Tôkyô, Kokubunzi,
Higasi Koigakubo 3-18-12 (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 1400 enoj)

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
))))))))Q

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

Pollando: S-ro Maciej PIEGAT, ul. Dantego 1-B/48, PL-01-914 Warszawa

Grava atentigo al niaj membroj !

1. La estraro prezentas sur la paĝoj 7 k.s. sian raporton pri la agado de IKEF dum la jaro 1994 kaj proponas aprobon de tiu raporto.

2. La estraro prezentas sur la paĝoj 10, 11 kaj 14 la financan raporton de IKEF por la jaro 1994, notante ke la ciferoj estas prezentitaj en bona tempo al la revizoro.
D-ro Polerani juĝis ilin bonaj kaj en ordo. Tial la estraro proponas aprobon de tiu financa raporto.

3. La estraro notas la sumon de financa deficito de 2.164 BEF kaj proponas deprenon de tiu deficito de la kapitalo.

4. La estraranoj d-ro Gether, s-ro Gilbert, s-ro König, s-ro Rotsaert kaj s-ro Yamasaki, ĉiuj elektitaj en 1993, baldaŭ estos du jaroj en sia ofico. Laŭ la statuto de IKEF, alineo 7.1, dua frazo, estrarano tenas sian oficon por du jaroj. Do ilia estraraneco finiĝos en julio ĉi-jare. Reelekto eblas. Ĉiuj pretas kandidatiĝi. En la nomo de IKEF, la aliaj estraranoj dankas ilin pro la laboroj faritaj dum la pasintaj du jaroj kaj proponas reelekton de ili.

5. Nia statuto, alineoj 7.4 kaj 8, montras la proceδon pri aprobo de la financa raporto kaj de la raporto pri agado. Ĉi-jare ni denove organizos Ĝeneralan Kunvenon por niaj membroj kadre de la Universala Kongreso en Tampereo, Finnlando. Diskutado kaj aprobo de la raportoj (vidu punktojn 1-3 supre) kaj elekto de estraranoj (vidu punkton 4 supre) okazos tie. Membroj kiuj ne povos veni al Tampereo, rajtas skribe komisii alian membron ĉeestontan pri aprobo kaj voĉdonado; tiun agon la estraro rekomendas. La precizan daton kaj horon kaj salonon de nia Ĝenerala Kunveno ni avizos en la venonta La Merkato.

6. La estraro konstatas la neceson de plialtigo de nia kotizo por kovri la kreskintajn elspezojn. Ni prezentos en la Ĝenerala Kunveno la proponon pri plialtigo de la normala kotizo de BEF 400 al BEF 600 por membroj loĝantaj en landoj laŭ UEA-kategorio A. Por membroj en landoj laŭ UEA-kategorio B ĝi restas BEF 400.

La Estraro de IKEF

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

## Anoncitaj aranĝoj

Urĝe - Kaptu la okazon !

La komerca ĉambro de Colmar, Francio, organizos ekspozicion pri "ESPERANTO KAJ KOMERCO" dum unu tuta monato, inter la 11a de aprilo kaj la 10a de majo. Firmaoj povas sendi al ni Esperantajn reklamajn prospektojn. Ni ekspozicios ilin senpage.

Michel Basso, TAKE-ESPERANTO,
8 rue du Tir, F-68000 Colmar, Francio

Informoj: Kava-Pech, Anglická 878, CZ-25229 DOBRICHOVICE, Ĉeĥio, fakso +42-2-9912126.

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))Q

21-23 aprilo 1995, Szombathely, Hungario: Komerco kaj Esperanto en la Alp-Adriaj regionoj. I.a. prelegos IKEF-estrarano I. Gether. Kotizo: 150 AS. Informoj: d-ro Judith Horváth, Wesselényi u. 2 / c II.2., H-9700 SZOMBATHELY.

20-24 majo 1995, Budapest, Hungario: Konferenco pri ekonomiko kaj Esperanto (preciza dato dependas de la Budapeŝta Internacia Foiro). Informoj: MOVILO, Nyírpalota u. 107, H-1157 BUDAPEST, fakso +36-1-1634840.
Konferenckotizo 30 USD. Ankaŭ mendeblas hotelo.

20-26 majo 1995, Pécs, Hungario: 47a fervojista-kongreso.

24-25 junio 1995, La Chaux-de-Fonds, Svislando: La mistero de la alfabetoj (Marco Picasso). Informoj: KCE, CP 779, CH-2301 LA CHAUX-DE-FONDS, telefono/fakso +41-39-267407.

26 junio - 5 julio 1995, Poprad-Tatry, Slovakio: FORUMO ETNOJ KAJ NATURO. Informoj: Dr. Lev Medvedev, Adademija Novego Myslenia (ANM), Pjatnickaja 7, RUS-113035 MOSKVA, fakso 7095-2330731, E-poŝto soceco(a)glas.apc.org kaj anthpub(a)iea.msk.su (ETNA'95) aŭ ETNA '95, Popradské nábrežie 16, 058 01 POPRAD, Slovakio; fakso 0042/92/455.612, E-poŝto astrinst(a)asu.savba.sk.

1-7 julio 1995, Budapeŝto, Hungario: TURISMO KAJ MEDIOPROTEKTADO. Informoj: Hungaria Esperanto-Asocio, pf. 193, H-1368 BUDAPEST, fakso (36-1)268-0331.

16-21 aŭgusto 1995, La Bouresse, Francio:
Kiel rilati kun la gazetaro ? (M. Picasso).

19-21 septembro 1995, Pardubice, Ĉeĥio: Scienca konferenco kun temo: "Nova kvalito en trafiko". Laborlingvoj ĉeĥa, slovaka, angla, germana,rusa, franca, esperanta. Informoj: Universitato en Pardubice, Trafikfakultato, str. Studentstká 84, CZ-530 09 PARDUBICE, fakso +42/404-84-00.

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))Q

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

<u>Traktato pri la Eŭropa Unio</u>

Laborgrupo en Luksemburgo esperantigas la tekston (reviziitan en 1992 en Maastricht) de la Traktato de Romo pri la Eŭropa Unio. Duono de la teksto (ĉ. 70 paĝoj, 110 KB) jam estas preta. Bonvenas kandidatoj por kontroli la ekonomi(k)ajn terminojn.
La teksto estas havebla tra la bultenejo (BBS) de FEL (+32 3 234.12.60 - 8N1 - 19a-7a h. MET, dosiero TRAKTAT.ZIP en ejo TEKSTOJ), tra Internet (ftp-ejo ftp.stack.urc.tue.nl sub nomo ftp://ftp.stack. urc.tue.nl/pub/esperanto/esperanto-texts.dir/eu-traktat.zip), tra CompuServe (dosierujo 8 de FLEFO sub la nomo TRAKTAT.ZIP) aŭ ĉe s-ro André RUYSSCHAERT, 4 rue Th. Eberhard, L-1452 Luxembourg (papere aŭ diskete: WP 5.1 aŭ ASCII).

<u>Kunlaboro inter IKEF kaj monda merkato</u>

Dum kelkaj jaroj IKEF subvenciis la aperigon de ricevitaj komercaj proponoj en la revuo monda merkato, eldonita de s-ro Alfred SCHUBERT, Germanio.

Intertempe konstateblis ke ankaŭ aliaj revuoj (i.a. Eventoj) aperigas tiujn proponojn. S-ro SCHUBERT decidis ĉesi la paperan eldonon de monda merkato kaj transdoni la aliajn aktivecojn (elektronikan datumaron kaj vendon de informoj) al nova, pli profesia entrepreno lb linguistisches bureau gmbh, kies laborlingvoj i.a. estas Esperanto.

<u>Survoje al pluiro</u>

La redakcio de la revuo Survoje anoncis paŭzon en la apero de la revuo. Kvankam numero estas preta, oni pro diversaj kialoj preferas prokrasti la aperon ĝis komenco de 1996. Abonantoj kompreneble rajtas repostuli sian pagon, sed ili se eble pacienco ĝis 1996, kiam la Survoje renaskiĝos.

Aleksandr Fedorov, Survoje,
UA-335057 Sebastopolo-57, p.k. 168, Krimeo

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))Q

## Raporto pri la agado de IKEF dum la jaro 1994

### IKEF fariĝis "Aliĝinta faka asocio de UEA"

Dum la 79a Universala Kongreso de UEA, je la 29a de julio 1994, la Komitato de UEA akceptis IKEF kiel "Aliĝinta faka asocio de UEA". Per tio ni i.a. rajtas delegi propran anon en la Komitaton, la superan organon de UEA. La estraro nomumis nian membron d-ro Gianfranco Polerani el Milano, Italio, komitatano. Tiu plej alta statuso de nia fakgrupo rilate al UEA postulas de ni trioblan kotizon al UEA.

### Membraro restas sur sama nivelo

Post la unuafoja falo de la nombro de membroj dum la antaŭa jaro de 114 al 110, en la raporta jaro 1994 ĝi denove re-kresketis al 115. Do oni povus diri, ke dum la lastaj tri jaroj estis preskaŭ ne vario. Aliflanke ni iom dolorete konstatas, ke ni sentas mankon de neta kresko, ĉar novaj aliĝoj estas kompensitaj per eksiĝoj de ĝisnunaj membroj.

### Estraranoj Braun kaj Picasso reelektitaj

En 1994 ne okazis oficiala Ĝenerala Kunveno. Por tia kazo preskribas nia statuto la procedon pri aprobo de la jaraj raportoj kaj elekto de estraranoj. Neniu membro skribe sin anoncis kontraŭ la raportoj. Tial la raportoj 1993 pri agado kaj financo estas aprobitaj. La ĝisnunaj estraranoj s-ro Braun kaj d-ro Picasso skribe estas unuanime elektitaj kiel estranoj por du jaroj, do ĝis julio 1996.

### La Merkato regule aperis

Dum 1994 nia komunikilo La Merkato regule kaj akurate aperis kvarfoje.

### Terminara Sekcio kun problemoj

La Terminara Sekcio sub kunordigado de s-ro Hans Wiersch (IKEF19) okupiĝis dum la jaro 1994 pri la Esperantigo de la oficiala vortaro de la komisiono de EU "Glossaire du monde du travail et du mouvement syndical". Ni nomas ĝin "Sindikata Terminaro". Pro manko kaj malsano de kunlaborantoj kaj pro diverĝo de opinioj pri pluraj terminoj inter la kunlaborantoj, bedaŭrinde la Sindikata Terminaro ne povis esti finfarita.

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))Q

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

Verka agado plifortiĝis

Ĝojige ni povis denove konstati dum la jaro 1994 kreskon de la verka agado fare de niaj membroj.

La "Ekonomia Bulteno pri Usono" de nia membro d-ro Goldman, Usono (IKEF 52) laŭdinde ankaŭ ĉi-jare regule aperis. Ĝian abonon ni varme rekomendas.

En MONATO, esperantlingva internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo, du IKEF-membroj estas responsa redaktoro pri iu fako: Roland Rotsaert (IKEF 3, ekonomio) kaj Yamasaki Seikô (IKEF 43, lingvo). S-ro Paul Peeraerts (IKEF 65) estas ĉefa kunordiganto de la revuo. Tial ne estas mirige, ke regule kaj multnombre aperis artikoloj pri ekonomiaj temoj. Ĉe tio distingiĝis krom la supre nomitaj redaktoroj jenaj IKEF-membroj: s-ro Franz Josef Braun (IKEF 4), s-ro Koffi Gbeglo (IKEF 41), s-ro Gilbert Ledon (IKEF 177), s-ro Zandandu Ntomono Zola (IKEF 181), s-ro Johan Pachter (IKEF 34) kaj s-ro Edward Symoens (IKEF 147).

Do la rubriko "ekonomio" en ĉiuj 12 numeroj de la jaro 1994 estis kontentige plenumita. Ĉe tiu okazo ni denove atentigas niajn membrojn pri la fakto, ke MONATO estas la ĉefa podio por nia verka agado, kaj ni rekomendas al ili la abonon de MONATO.

S-ro Yamasaki ankaŭ kunlaboris al la "Manlibro pri politiko" de s-ro Stefan Maul pri inter alie nombro da ekonomiaj kaj ekonomikaj terminoj.

Instruado kaj informado kreskis

Nia estrarano d-ro Picasso (IKEF 23), fakulo pri merkatiko kaj informado, denove gvidis seminarion ĉe "La kvinpetalo" en Bouresse, Francio, kun la temo/celo, kiel formi homojn kiuj deziras fariĝi informistoj pri Esperanto. Similan seminarion pri "kiel rilati kun la gazetaro" li gvidos je 16-21 aŭgusto 1995.

Ĉe la kongreso de BAVELO (Baden-Virtemberga Esperanto-Ligo) en Konstanz (suda Germanio) de la 30a de septembro ĝis la 3a de oktobro 1994 kun la titolo "Esperanto nutzen" (uzi/utiligi Esperanton) aktive per prelegoj partoprenis niaj membroj d-ro Bormann (IKEF 27), s-ro Braun, d-ro

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

Picasso kaj s-ro Rotsaert.

Dum la Hispana Kongreso de Esperanto 1994 en Malago, kies temo estis "disvastigo de Esperanto per informado kaj instruado", nia membro s-ro Andrés Martin Gonzales (IKEF 199) prezentis IKEF kaj ĝiajn celojn.

Al la rubriko instruado ni ankaŭ almenaŭ parte envicigas la 4a IAKSTE (Internacia Akademia Konferenco de Scienco kaj Tekniko en Esperanto) okazinta de la 10a ĝis la 17a de julio 1994 en Pekino. Ĝi estis kunpreparata de nia membro prof. Shen Chengru (IKEF 74); partoprenis kelkaj aliaj membroj.

Dum la 79a Universala Kongreso de UEA en Seulo, Koreio, okazis je la 28a de juli 1994 informkunveno pri la agadoj kaj celoj de IKEF. Ĉeestis 25 interesatoj. La informkunvenon prezidis nia membro s-ro T.S. Lee (IKEF 11), el Hongkongo.

Dum la Eŭropa Esperanto-Festivalo je la 13a de julio en Százhalombatta, Hungario, d-ro István Gether (IKEF 7) faris prelegon titolitan "Movada komerco - komerca movado".

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

bil1

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

bil2

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

<u>Praktikaj agadoj</u>

En MONATO denove aperis reklamanoncoj de aŭstra kaj germana firmaoj, peritaj de s-ro Braun. Ni opinias, ke la perado de tiaj anoncoj al MONATO kaj aliaj esperantlingvaj magazinoj estas unu el la plej efikaj agadoj.

Bedaŭrinde la tutmonda informservo monda merkato de nia membro s-ro Alfred Schubert (IKEF 126) ĉesis sian aperon. Tial la alvenintajn anoncojn ni povis nur aperigi en nia komunikilo La Merkato, per kio ili atingis ne tian grandan adresataron kiel per "monda merkato". Tamen estas grava agado kaj celo laŭ nia statuto, senkoste aperigi tiajn petojn/proponojn el diversaj landoj de la "tria mondo" por komerco inter Esperantistoj surbaze de nia lingvo.

La "identecŝildaron" (registro de IKEF-membroj kun specifaj informoj) prizorgis kaj ĝisdatigis nia estrarano s-ro Rotsaert.

S-ro Gilbert (IKEF 14) kune kun sia ĉambro pri Komerco kaj Industrio de Bar le Duc (Meuse, Francio), publikigis kvinlingvan broŝuron (en la franca, germana, angla, nederlanda, Esperanto) kun la titolo "Bienvenue en Meuse - guide de conversation entre les commerçants et les touristes étrangers" (Bonvenon en moza regiono - gvidlibro por konversacio inter komercistoj kaj fremdlandaj turistoj).

Je la 21a kaj 22a de julio 1994 okazis kunveno de IKEF-membroj en Shenzhen, Ĉinio, kiun estis organizinta s-ro Lee Teck Shiu, Hongkongo, Du Shou He (IKEF 80), Shenzhen, kaj nia ĉina peranto Wang Tianyi (IKEF 117). Partoprenis ankaŭ ne-membroj interesataj pri komerco inter Ĉinio kaj Eŭropo. Ĉe tio oni vizitis du fabrikojn en la regiono. Ankaŭ la amuza parto de la kunveno kontentigis la ĉeestintojn.

Niaj entreprenistaj membroj el Ĉinio kaj Hongkongo, s-ino Li Renzhi Eruda (IKEF 156) kaj s-ro Lee Teck Shiu denove faris vojaĝon al Germanio kaj Belgio. En Germanio ili vizitis i.a. estraranon s-ron König (IKEF 54) kaj sian komercan partneron s-ro Braun ĉe firmao BOSCH, kun kiu s-ro Lee faras daŭran komercadon, kaj en Belgio i.a. s-inon Flory WITDOECKT (IKEF 78), kiu diversmaniere komercas kun Ĉinio.

Post analizado de diversaj eblecoj en komerco por Esperanto-organizaĵoj kaj Esperantistoj, vidante ŝancon en multnivela

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

merkatado, d-ro István Gether komencis kunlabori kun Esperantistoj en Hungario. Post pozitiva reago li laboris ankaŭ en Pollando, tiel ke ne nur la individuoj sed ankaŭ la Esperanto-organizaĵoj partoprenas en la laboro kun siaj membroj. En Hungario li havas kunlaborantojn en 10 departementoj de la lando; la reto okupiĝas pri varoj.

Agadprogramo '94/95 ellaborita kaj prezentita de la estraro

En la Merkato n-ro 45 de juli 1994 la estraro prezentis sian ĵus ellaboritan "agadprogramon '94/95" al la membraro. Temas pri kolektaĵo de celtrafaj agadoj, kiujn la estraro surbaze de okjara sperto rigardis realigindaj fare de nia membroj. La estraro opinias, ke la membroj devus plifortigi sian aktivecon por antaŭenigi nian aferon en la 10a jaro de ekzistado de IKEF.

Resumo

La jaro 1994 ne estis tiom sukcesa kiel komence supozite. Kompare al la antaŭa jaro, kelkaj agadoj plifortiĝis, kelkaj malplifortiĝis aŭ eĉ elfalis, do averaĝe samnivele. Elstara evento de la jaro estis la akcepto de IKEF kiel "aliĝinta faka asocio de UEA". La laŭdon kiun UEA tiukadre aljuĝis al ni, ŝajnas iom antaŭdonita laŭro, sur kiu ni nepre ne ripozu. Bona okazo por fine meriti tiun laŭron, estas la 10jara ekzistado de nia fakgrupo, kiun ni festas en la kuranta jaro 1995.

La kampoj de nia profesio, komerco, ekonomio kaj ekonomiko, estas tiom vastaj, ke por ĉiu de ni, per inteligenta, diligenta kaj persista kultivado ekestos sukcesoj. Ni ne rezignaciu pri la malgrandeco de tiuj sukcesoj kompare al la giganteco de la taskoj. Vi ja scias, se oni volas manĝi elefanton, tiam oni ne povas ĝin engluti per unu fojo, sed nur tranĉaĵete.

Franz Josef BRAUN

Financa raporto de IKEF por la jaro 1994

Sur paĝoj 10-11 trovigas la spezokonto por la jaro 1994 kaj la bilanco je 31 decembro 1994. Mi komence rimarkigu ke fine de januaro 1995 - kiam la ciferoj estis senditaj al la revizoro - kelkaj ciferoj ne jam estis konataj kaj aperos en

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

la venontjara spezokonto.  Temas pri enspezo de 2.291 BEF (belgaj frankoj) (rento je ŝparkonto) kaj kosto de 950 BEF.

Dum 1994 IKEF havis malgajnon de 2.164 BEF.  Jen la ĉefaj kialoj:

- kelkdekaj membroj je jarfino ne jam pagis sian kotizon por la jaro 1994; ili intertempe ricevis personan leteron de la prezidanto kaj jam envenis pluraj pagoj;
- ĉar IKEF nun estas aliĝinta faka asocio kaj pagas pli altan kotizon al UEA (285 NLG, ĉ. 5.000 BEF);
- pro malgranda partopreno de IKEF-estraranoj en la UK ne estis vendoj de terminaroj kaj nur malmultaj novaj aliĝoj.

En 1994 estis pagitaj nur 3 numeroj de La Merkato (la unua numero de 1994 jam estis preta fine de 1993).  Tiu hazarda ŝparo ne povis kompensi la supre menciitajn negativajn faktorojn.

Dum 1994 ne estis specialaj kostoj pro informado; tamen baldaŭ necesos represi informilon.  La "rutina" informado (korespondado, sendo de provnumero de la revuo...) estas inkluzivita en la kostoj de La Merkato kaj afranko kaj telefonado.

Roland ROTSAERT

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

## Nova emblemo por IKEF

Post longa diskutado la estraranoj de IKEF ĵus atingis interkonsenton pri nova emblemo por la asocio. Ĉe la lasta voĉdonado restis jenaj tri proponoj:
- propono de itala grafikisto perata de d-ro Picasso; ĝi ricevis 9 poentojn;
- la nuna emblemo iam desegnita de s-ro König (11 poentoj);
- propono de Flandra Esperanto-Ligo, kiu ricevis 16 poentojn kaj estis elektita.

La FEL-propono nun estas finpolurata. Ĝi iĝos la bazo de nova "domstilo" por IKEF: revuo, leterpapero, stampilo, informilo...

(nuna) (Picasso)

(FEL, elektita)

## Nacilingvaj tekstoj de formularoj por magistriga disertaĵo

Pola studentino Marzena Budziszewska, str. Podgórna 44, PL-05-822 MILANOWEK) kolektas diversajn nacilingvajn tekstojn de formularoj (traduko ne necesas). Temas pri ĝeneralaj kondiĉoj de kontraktoj, modeloj de kontraktoj kaj regularoj kaj formularoj por diversaj kontraktoj.

AP

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

Terminologio

Hans Wiersch definitive forlasis IKEF

Kun granda bedaŭro ni devas avizi al nia membraro, ke s-ro Hans Wiersch (IKEF 19) denove kaj definitive demisiis de sia posteno kiel kunordiganto de la Terminaro Sekcio pro opiniaj diverĝecoj lingvistikaj.

Ni alvokas niajn membrojn al partopreno en la terminara laboro. Kiu ŝatas lingvistikon kaj havas talenton pri vortokreado, anoncu sin al la prezidanto.

F.J. Braun

2587 juraj terminoj

Slavjanska Akademia Centro de Administrado, Entreprenado, Juro (prof. Fjodor Poddubnij) kompilis juran terminaron Esperantan-rusan-ukrainan-anglan. Esperanto estas baza lingvo. Mendebla ĉe UEA je 59,70 NLG.

Lingvouzo en internaciaj konferencoj

La Unio de Internaciaj Organizoj (Bruselo) meze de 1993 dissendis pli ol 10.000 enketilojn al sidejoj de internaciaj neregistaraj organizoj. Revenis 2.905 respondoj. Nun ĝi aperigis la rezultojn de la enketo.

Evidentiĝas ke okaze de internaciaj kunvenoj 52 % uzas unu lingvon por buŝa komunikado, 22 % uzas du lingvojn kaj 16,5 % uzas tri lingvojn. Kompare kun enketo el 1985, la unulingveco kreskis je 9,5 %. Plej uzataj estas lingvoj angla (90,45 %), franca (44,70 %), germana (20,85 %) kaj hispana (15,25 %).

RR

Komercaj petoj kaj proponoj

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

Serĉas laborpostenon en Ĉinio en esperantista firmao, kiu okupiĝas pri importo-eksporto aŭ alilanda turismo s-ro Ivan Nikolov (IKEF 186).
Donitaĵoj: 32-jara fraŭlo kun supera ekonomia klero; parolas bone esperantan kaj rusan lingvojn, parte germanan kaj anglan; havas sciojn pri internacia komerco kaj spertojn en ĝi kun la landoj el eksa Sovetio. Proponojn pri laŭkontrakta dungo por 1-3 jaroj sendu al: ESPER-KOMERC, Ivan Nikolov, Ekzarh Josif 7, p.k. 2, BG-5250 SVISTOV, Bulgario.

Ĉeĥio

S-ro Miroslav VOLNÝ Palkovice 484, ČR-739 41 FRYDEK-MÍSTEK, tel./fakso 0658/23385 (IKEF 124) ofertas vinojn, alkoholaĵojn, naturajn manĝaĵojn; petas informojn/produktojn por ŝparo de energio.

Ĉinio

Komerca filio de ŝipfabriko eksportas: elektrajn motorojn, cementon, lesivon, galanterion, teon, kotonaĵon, manĝaĵojn. S-ro Tuo jiu, Wuhuzaocuanchang, CN-241000 WUHU, ANHUI, fakso (0553) 332708.

Amonio para-volframa (amonio para-tungstena, APT) [$5(NH_4)_2O$ $12WO_3$ $5H_2O$] en plastika sako kun fera sitelo ekstere; USD 9.000/tuno, FOB Ŝanhajo. S-ro Sun Rong Yao, Room 208/920, Qinzou Road, Shanghai.

Eksporto de diversaj varoj (precipe tekstilaĵoj); importo de kotono el Rusio (prezofertoj en usonaj dolaroj). Prof. CUI Jianhua, Nanjing Universitato, Departemanto Aplikata Fremdlingvo, CN-210093 NANJING; fakso (25)3304463, E-poŝto postdafs(a)nju.edu.cn.

Hispanio

Aĉeto kaj vendo de antikvaĵoj: numismatiko (moneroj, biletoj), horloĝoj, libroj, kolektoj... Sendu leteron kun detaloj kaj eventuale foto. LA KAVERNO, C/. Arquitecto Emilio Piñero 7, E-30007 MURCIA; tel. 968-23.37.75.

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

Muzikisto-koncertisto prezentas i.a. albumon (80 min.) pri poemoj de Ibere-Libere-grupo, 4 voĉoj, pli ol 40 instrumentoj/stiloj, kun tekstkajero. Kosto de kasedo po 1.900 pesetoj + sendkostoj; rabato ekde 5. Eduardo Vargas Gutierrez, C./Ayala 3, E-29002 MALAGA, tel. 952-34.32.96.

<u>Kameruno</u>

Fondaĵo Ruben Um Nyobe bezonas por kampara disvolviĝado: fabrikojn por prilaborado/produktado de teksaĵoj, ĉokolado, palma oleo, cimento, ligno. Interŝanĝe eblas liveri kakaon, kafon, bananojn, arakidojn, kotonon, lignon, karbon, palman oleon, palmajn nuksojn, ne tanitajn bestohaŭtojn ktp.
Dr. Jean MOUTYMBO, Clinique Nouvelle, B.P. 861, Douala, Cameroun; tel. (prefere je 19a h.) (237) 37.18.81.

S-ro Jean-Marie Mboge-Mbele (IKEF 18) havas kontaktojn kun grava ligno-eksportisto. Interesitoj bv. kontakti lin per fakso 237-43.24.40.

<u>Ruslando</u>

Esperanto-Klubo, (Timofej Ŝuvaev - Olga Ĵukova), Str. 60 Let Oktjabrja 6-135, RUS-626440 NIJNEVARTOVSK-6 (Siberio) serĉas komercajn kontaktojn. Detaloj aperos en posta numero.

<u>Belgio: vizitoj al entreprenoj</u>

La ministerio pri ekonomio de la brusela regiono proponas vizitojn al entreprenoj. Oni celas delegitojn kiuj vizitas Belgion kaj ŝatas ekkoni la industrian aspekton de Bruselo. Informoj: tel. 32-2-410.99.50. (el informilo de FIO, 2.95)

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))Q

Kurso de H. Behrmann dum UK

Eble s-ro Behrmann dum la UK organizos kurson por la membroj de IKEF pri la strategiaj metodoj de germana manaĝero Wolfgang Mewes. Detaloj aperos en venonta LM.
Jen kelkaj ideoj de Mewes:

### Manaĝerada revolucio - perspektivoj 2000

Kvar devizoj por nova ekonomia konduto:

1. Ne kapitalo, sed spirita potenco

2. Ne linearaj, sed plurdimensiaj pensado kaj agado

3. Ne maksimumigi propran profiton, sed agadi efike por sia medio

4. Ne centralismaj, sed individu-kooperaj strukturoj

Televida elsendo pri Esperanto preparata

S-ro Antoine Vonnet (5, rue Faidherbe, F-75011 PARIS) preparas por franca TV-ĉeno Canal J elsendon destinitan al geinfanoj 7 ĝis 14-jaraj. Ĝi estos episodo (13-minuta) de la serio Regarde le Monde. La programo enhavos tri erojn: (1) kio estas Esperanto; (2) filmado en Gresiljono inter 24a-29a de aprilo; (3) debateto inter 5 infanoj kaj Claude Piron. [La E-gazetero bonvolu transpreni ĉi tiun informon kaj sciigi tion al s-ro Vonnet.]

Esperanto-staĝoj en Francio por eklernantoj kaj progresantoj apud Mediteranea Maro: 24-28 majo 1995 en Agde (Hérault): informoj ĉe Cercle Biterrois d'Espéranto, 9 Rue G. Picot, F-34500 BEZIERS; kaj 2-9 septembro 1995 en Sète: informoj ĉe Yvette VIERNE, 5 Rue du Docteur Roux, F-34000 MONTPELLIER, tel. 33.67.54.15.43.

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))Q

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
))))))))Q

## Donacoj

Dum la jaro 1994 la kasisto danke ricevis jenajn donacojn: anonima (20.470 BEF), Braun (62 BEF), Dengler (205 BEF) kaj Lee (1.101 BEF).

## Novaj aliĝoj

62. D-ro Paolo CERRETINI, Via San Giusto 14, I-56100 PISA, Italio; telefono+fakso 050-24527 (realiĝo)

201. S-ro Odamir Feitosa de Sá Filho, bankoficisto, Rua João Velho do Rego 572, BR-03967-000 SAO PAULO, SP, Brazilio.

202. S-ro Vang Bing, Gongshanglian Qianshan, CN-246300 ANQING, ANHUI, Ĉinio (pliaj informoj en aldono al iŝ)

203. S-ro Vladimir BOĈKAREV, Dementjeva 15-35, RUS-141170 Monino Moskovskoj obl. (hejmo); Kirovskij 3/26, RUS-107078 Moskvo (laborejo), Rusio; telefono (7-095)928-70-63, fakso (7-095)928-42-21 (laberejo).

## Adresŝanĝo

175. Christian PAPENMEIER (IMS - International Moving Service): Hirtenstr. 9-11, D-60327 FRANKFURT-MAIN, tel. (069)24 26 55 22, fakso (069)24 26 55 55

## EDIRA
## (Elektronika dokument-interŝanĝo - registrado-aŭtoritato)

En la aŭtomobila industrio la transsendo de dokumentoj (mendiloj, sendlistoj, fakturoj...) per komputilo jam estas tute kutima. EDI entendiĝos al ĉiuj industrioj kaj registaraj instancoj, sed ĝis nun ne ekzistas identeckodo unika, valida tutmonde. Tion, kun helpo de Eŭropa Unio, ellaboru la EDIRA-projekto. Kunlaboras i.a. AFNOR (Parizo), Ediforum Italia (Milano), EAN (Bruselo), NHS (Britio) kaj diversaj komercaj ĉambroj.

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
))))))))Q

Aldonoj al IKEF-identecŝildaro 1994-1995

Nomo: lb linguistisches bureau gmbh Membronumero: 126

Adreso: Postfach 1539, D-82355 WEILHEIM

Telekomunikado: telefono +49-8809-757; fakso +49-8809-1234

Proponataj varoj/servoj:

Servoj rilate al lingvoj (germane, angle, france, esperante)

Rimarko:

Ni pagas makleraĵon (laŭ individua interkonsento) al peranto

*************************************************************

Nomo: S-ino Li Renzhi (Eruda) Membronumero: 156

Firmao/Asocio: China Internacia Enterprises

Privata adreso: Dong Chang Str. 92-5-8, Tong Hua JiLin, Ĉinio

Profesia adreso: 1/F Rear Portion, 38 Caine Rd., Central, Hong Kong

Telekomunikado: telefono +852-25233708, fakso +852-25232836

Proponataj varoj/servoj: artefaritaj juveloj, ĉinaj medikamentoj, ginsenga varo (teo, plifortigaĵoj kaj kosmetikaĵoj), teksaĵo, lignaĵo.

Lingvaj kapabloj: germana, angla, ĉina

Rimarkoj: serĉas produktantojn kaj aliajn varojn laŭ bezono.

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))Q

Nomo: S-ino Ginka Dilova Membronumero: 173

Profesio: komercistino

Firmao/Asocio: "IVA-DILOVI"

Adreso: str. Bajlovo, bl.86 vh B2, ap. 31, BG-1517 SOFIA, Bulgario

Telekomunikado: telefono+fakso 00359-2-450713 [por Ginka Dilova]

Proponataj varoj/servoj: turismo, importo-eksporto, produktado de virinaj kaj infanaj vestaĵoj, konstru- kaj investagado.

Deziratajvaroj/servoj: kontaktoj kun individuoj/grupoj ekskursontaj en Bulgario; ĝenerale kontaktoj kun komercistoj.

*************************************************************

Nomo: Liu Xiaozhe Membronumero: 200

Naskiĝjaro: 1966

Profesio: komercisto kaj peristo

Adreso: 32 North Youhao Road, Urumqi 830000, Ĉinio

Telekomunikado: telefono hejme +86 991 2846127, oficeje +86 991 4841216-219, fakso +86 991 4841546

Proponataj kaj deziratajvaroj/servoj:

Nia kompanio mem importas kaj eksportas varojn; samtempe peradas por importi kaj eksporti, investi, enkonduki teknikon kaj eksperton, eksporti laboran forton, reklami,

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))Q

ekspozicii, prezenti, aranĝi turismon ktp.

Lingvaj kapabloj: angla, franca, rusa, ĉina

**********************************************************

Nomo: Vang Bing

Membronumero: 202

naskiĝjaro: 1958

Profesio: tradukisto - ekonomikisto (statistiko)

Firmao/Asocio:

Federacio de industrio kaj komerco
Gongshanglian Qianshan, CN-246300  ANQING, ANHUI

Telekomunikado:

tel. privata 00-86-556-8921282, tel. of. 00-86-556-8921145, fakso 00-86-556-8922188

Proponataj varoj/servoj:

Tekniko de kultivado de verdhara testudo (1000 USD); testudo kostas po 2,50 USD.

Dezirataj varoj/servoj:

Tekniko de familiuza aŭteto elektra tutplasta

S))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))Q

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q

Nomo: S-ro ONO Takao Membronumero: 198

naskiĝjaro: 1961

Profesio: komputila inĝeniero; butikisto

Firmao/Asocio: A.K. Creative Planning

Privata adreso: Kazigaya-tyo 42-1, Sakae-ku, Yokohama, 247 Japanio

Profesia adreso: Kazigaya-tyo 43-8, Sakae-ku, Yokohama, 247 Japanio

Telekomunikado: fakso +81.45.894.9145 (kun voĉsurbendigilo); telefono +81-45.894-5339 (kun voĉsurbendigilo kaj fakso), E-poŝto JAC04046(a)niftyserve.or.jp (Internet).

Proponataj varoj/servoj: (1) Elektronika libro aŭ albumo aŭ multemedia kreaĵo por Mac- kaj Windows-komputilo; (2) konverto, traduko kaj modifo de via multemedia kreaĵo, kaj aliaj programoj; (3) propra sistemo por persona komputilo; (4) verko, konsilo, takso... pri personaj komputiloj, MIDI-sistemoj, diĝita muziko; pri japana biero, sakeo, aliaj drinkaĵoj; (5) varoj trakteblaj: elektronikaj kaj muzikaj partaĵoj, softvaro; diĝita muziko, japanaj drinkaĵoj.

Deziratаj varoj/servoj: (1) Diversspecaj varoj ĉarmaj, interesaj kaj utilaj kiel "spicoj" de la vivo de miaj klientoj; (2) kunlaborantoj pri E-vortaro kajaldonota sistemo por internaciaj vortoproceziloj kiel WordPerfect, NISUS Solo Writer k.s. kaj por Mac-WorldScript.

Lingvaj kapabloj: japana, angla

Rimarkoj: trakteblas varoj nur en malgranda kvanto; ĉiuspeca propono uzanta/rilata al Esperanto bonvena.

S)))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))))
)))))))Q